
VIVU LA JUBILEA JARO 1992

400 jaroj ekde la naskiĝo da Jan Amos Komenský – Komenio

105 jaroj de Esperanto

90 jaroj de la Esperantista Klubo en Praha

Programo de la klub-kunvenoj en la 1-a jarkvarono 1992:

- | | | |
|-------|--|---------------|
| 6.1. | Libera tribuno: preparo de la Bulteno | |
| 13.1. | La jubileoj de la jaro 1992 | - Patera |
| 21.1. | Promenoj tra Prago | - Patera |
| 27.1. | Vojaĝo tra Baltaj respublikoj | - Dr. Čočelín |
| 3.2. | E l i U r b a n o v á – okaze de ŝia vivojubileo | - Seemannová |
| 10.2. | Veksilologio | - Patera |
| 17.2. | Libera tribuno | |
| 24.2. | L a J a r k u n v e n o d e l a K l u b o | |
| 2.3. | Gramatiko en kubo | - Seemannová |
| 9.3. | Jan Amos Komenský-Komenio kaj planlingvo | - Mařík |
| 16.3. | Promenoj tra Prago | - Patera |
| 23.3. | Libera tribuno: kantado | |
| 30.3. | Malsato en la mondo | - Ondráček |
| 6.4. | Preparo de la nova numero de Bulteno | |

La klubkunvenoj okazas ĉiulunde inter la 17.30 h kaj 20.00 h en la klubejo en Vejvodovastrato n-o 1. Se okazos ŝanĝo de la kunvenejo, ĉiuj klubanoj estos ĝustatempe informitaj.

Atentu bone, ke la ĉi-jara J a r k u n v e n o okazos la 24-an de februaro! Nepre venu ĉiuj, ĉar estos traktataj ne nur la problemoj de la Klubo, sed ankaŭ la aranĝo de la Antaŭkongreso de la Universala Kongreso kaj la solenaĵoj de la 90-jariĝo de nia Klubo. Via ĉeesto en la kunveno kaj via helpe estos bonvenaj.

Jaroslav Hašek

Konciza enhavo de sanga romano

"Giuseppe Bóro venis en Triesto'n- Ĉar li ne havis monon por longa restado, li prezentis sin sub la nome grafo Olarich de Eisenfels al la gastejestro Bittornelo, kiu havas belan filinon Lucia. Ŝi enamiĝas al la falsa grafo, sed Giuseppe Bóro estas en la urbo ekvidita de kanajla maristo Lorenzo, kiu konas certan sekreton el la viv de Bóro, kaj nome, ke tiu mortigis en Romo la deloginton de sia fratino kaj ankoraŭ tri sinjorojn, kiuj ĉe la ago helpis al la deloginto. Kaj tial tiu Giuseppe Bóro tre ektimas kaj konfidencas tion al gastejestro Bittornelo, kun kiu li komencis intiman fratecon ĉe glaso da vino. Ambaŭ decidiĝis venenigi Lorenzon, kion ili ankaŭ sukcesas aranĝi, post kiam ili ensekretigis ankaŭ la filinon Lucia. La kadavron de Lorenzo ili ensakigas kaj forportas nokte en la montaron malantaŭ la urbo, kie estas grandaj abismoj. Ili havas la intencon en en iun tian abismon ĵeti la sakon, kaj jam ili estas super tia krutaĵo, kiam subite surprizas ilin ĝendarmono. Lucia savas ilin kaj enpuŝas ponardon en la koron de la ĝendarmono, ĝuste kiam tiu estis saltinta de sur ĉevalo por rigardi, kion ili faras. La kadavron de Lorenzo kaj la ĝendarmon ilin ĵetas en la abismon, sed tiam la forlasita ĉevalo ekhenas kaj proksime aŭdiĝas ĉevala hufobruo kaj aperas nova ĝendarmono. Tiu mortigas per pistol-pafo Giuseppe Bóro kaj ĉiuj kontente foriras hejmen, la daŭrigon mi ne havas, sinjoro eldonisto."

La juna viro, sidanta kontraŭ la eldonisto de sangoplenaj romanoj Tomsa, malgaje ekrigardis en la okulojn de tiu ĉi bona viro, kiu ekkriis: "Sed jen jam ĉesas ĉiuj ŝercoj, sinjoro Krámský, kio estos plu, kien vi metos la ceterajn kadavrojn? Viaj homoj estis restontaj tie, ĉar la pafo devas venigi ankoraŭ alian patrolon da ĝendarmoj, efektivigos kruela batalo, tiel mi imagas la tekston, oni tordas la kolon, ĉu vi konprenas, juna viro? Cetere vi estas tre nesingardema ĉe manipulado de pafilo. Vi pafas nokte, forportante kadavron por ĵeti ĝin de sur roko kaj post kiam vi mortigis jam unu ĝendarmon. Tio estas eraro, granda eraro, tio estas kompleta malkaŝiĝo. Se via Lucia operaciis sukcese per ponardo, kial ankaŭ la ĝendarmon vi ne trapikis!"

Sinjoro Tomsa leviĝis kaj apogante sin je tablo de la duonplena kafejo flamoplene li laŭte ekkriis: "Kial vi, mi demandas vin ankoraŭfoje, ankaŭ la alian ĝendarmon ne mortigis per ponardo. Vi povis ankaŭ puŝi ponardon en lian koron kaj estis post la komedio. Kompreneble, la junuleto ne sekvas la malnovan elprovitan ŝablonon. Tia estas hodiaŭ la junularo! Vi ja konis la bedaŭratan Charvát, tiu ja scipovis maniuli per ponardo! Tie estis en la jaro 1900 kaj li daŭrigis ĝis la jaro 1905, kaj tio estis en Germanio, kaj li laboris nur per ponardo kaj veneno. Pafado nokte faras bruon. Se vi daŭrigos plu, kiel vi el tio eliĝos, tion afable klarigu al mi; vi implikiĝos tre malagrabla. Mi parolas al vi kiel patro, vi estas tre komprenema, sed mi opinias, ke ne estas ĉio perdita... Vi devas nun profituzi la okazon kaj kuri. Ĉu vi ne komprenas, ke post tio, kio okazis, la reveno en la urbon estas neebla. Vi devas trovi la vojon en la mondon. Unue estas necese komenci per rabado. Murdu eĉ virinojn kaj infanojn, kaj Lucian arestigu laj liberigu ŝin, kaj eble, kaj tio estas la ĉefaĵo, ekiru al la loko, kie ŝi estas arestata kaj batmortigu gardiston. Mi konsilus al vi kaŭĉukan bastonon kaj neniun revolveron, tiam vi ree implikiĝus, ĉar tia pafo ekscitigus kiun ajn."

"Mi certigas vin, ke mi ne plu pafos," respondis la juna viro, "Mi dankas al vi pro la konsilo, kaj ĉu mi rajtas uzi plu venenon? Kiu veneno mortigas senspure?"

"Estas videble, ke vi en la afero ne laboris longe, kiel la bedaŭrata Charvát, veneno postlasas spurojn, kaj poste sekvas la sekcado. Nur lasu sekci kaj tiam kuracistoj malkovru eble strikninon. Per venenoj laboru okulfrape. Precipe riĉajn parencojn kaj simile estas eble veneni, ekzemple malsubite, tio estas pli efika. Por ke mi do ne forgesu, kiam vi mortigas gardiston, ĉio estos en ordo, kaj vi ne rajtas forgesi, ke la nuna tempo postulas ankaŭ prirabon de ĉiuj bankoj. Servistojn oni senkonsciigas per kloroformo, aŭ oni injektas al ili rerimarkeble kuraron en la sanon. Pezajn ferajn kasojn oni frakasas per dinamito. Kaj poste vi povas uzi revolveron. Tiam estas vico de revolvero kaj braŭningo estas eminentaĵo. Belege ankaŭ aspektas atenco de trajno. Ankaŭ en publikajn ejojn vi povas penetri, en teatrojn, restoraciojn, kafejojn, kaj kiu ekrezistas kaj ne volos doni monon, tiun senkompatate mortigu kiel hundon, mi diras kiel hundon, juna viro, kaj nun kun emo eklaboru!"

Ili leviĝis kaj al sia surprizo ekvidis, ke ĉirkaŭe surgenuas kun kunmetitaj manoj la gastoj, kelnero, pikolo kaj kafejposedanto, kaj kun muta rezignacio al la sorto ili petas pri kompato. (Tradukis J. Patera)

Kantu kune!

Du forĝistoj

1. Loĝas en urbeto pace en kvieto
du forĝistoj sur la plac'.
Unu hufferumas,
dua anindumas
Anjon el bien' sen lac'.
2. Luno hele brilis kaj mi amsopiris
sur la voj' al amatin'.
Luno brilis hele nokte surĉiele
kvazaŭ ĝi komprenus min.
3. Sendis el vilaĝo al mi jen mesaĝon
bienula solfilin'.
Ke ŝi ne malemus. se mi al ŝi venus
kaj brakumus arde sin.
4. Fil', pripensu bone antaŭ al senkone
iĝi por virino sklav'.
Ĉar ne ĉiam bona ino el bona
estas, kiom pasos rav'.
(Jiří Kořínek)

John Brown

1. Negrojn suferigis vipo de sklavist',
vidis ĝin John Brown kun trist'.
2. Trup' el Virgini' leviĝis al milit'
por liber' sub lia gvid'.
3. Aron kuraĝulan venkis la perfort',
al John Brown juĝita mort'.
4. De urb' Charleston aŭdiĝas trist-sonor',
de John Brown jen lasta hor'.
5. Korpo de John Brown ne estas plu ĉe ni,
vivas lia bon-ĝeni'.
(Josef Cink)

Katjuška

1. Jam printempo blovas tra la arboj,
nova vivo venas el la ter'.
Tra la kampoj venas jen Katjuška
laŭ la gaja flua de l' rivet'.
2. Katjuška aŭdiĝas mildan kanton
kun malĝojo rememoras ŝi:
Iam al ni kantis ĝin amanto,
kiu estas malproksime nun.
3. Katjuška, ridetu nun al vivo,
belaj tagoj atendas vin,
la ama almenaŭ revenos,
el vilaĝoj xx.. oo dancos vi.

Kamaradoj, ek al min-labor'

1. Tenas mi en mia rememor'
la unuan iron al labor',
al minejo sur la vojo
paŝis mi kaj kun la ĝojo
kaj kun hezit'.
Panjo min brakumis ĉe drir'
kun larm' en okulo kaj sen dir'
kaj mi iris for sen triste
kiel nova jun-ministr kun la ekscit'.

Rf. Kamaradoj, kamaradoj,
ek al minlabor',
kamaradoj, kamaradoj,
ĝoje sen angor'.
Dum maten' ni ree el la ŝakto
suprenigos nin,
kamaradoj, kamaradoj,
ek al la patrin'.

2. Sub la tero estas kamarad'
por la karbo-ĉar' al trenad',
venis ni en ŝakton kune,
vivon donus mi eĉ nune
por ĉi amik'.
Ĝi per hufo-fera gaja tint'
tuj respondas al mi-salutint',
ĝi sur teron ne revenos,
ade veturilojn trenos
sen ajna strik'.
(Josef Cink)

Vojzorgista kanto

1. Sur ŝoseo al Pariz'
vivas juna vojfarist',
martelis li sur voja gruz',
por ke taŭgu voj' por uz'.
2. Or-kaleŝa sinjorin'
ĉe labor' ekvidis lin,
ho, vojjorgist' ŝi diris do,
peno via pezas tro.
3. Li respondas kun sincer':
Sinjorino, estas ver',
se povus mi laŭ moŝtsinjur'
sidi ja en kaleŝ' el or'
mi ne penus en labor'.
(Jiří Kořínek)

VÝZVA K ESPERANTISTŮM --- VÝZVA K ESPERANTISTŮM ---VÝZVA !!!

Kladno, 25.11.1991

Praha, 3.1.1992

Vážení přátelé !

oslovujeme Vás ve složité době, kdy esperantské hnutí u nás je hroženo současnými ekonomickými okolnostmi. Buďme realisté - pomoci si musíme sami.

J A K ?

Prvním krokem ke skutečné nezávislosti hnutí je zajištění finančního krytí naší činnosti. Využijme některé možnosti, které nám poskytuje právě vznikající tržní hospodářský systém v naší zemi.

KTERÍ TO JSOU ?

1/ Vytvářejme fondy na podporu esperanta v ČSFR;

NEZÁVISLÁ TERMINOLOGICKÁ NADACE pro podporu esperantských odborných aktivit v oblasti rozvoje odborných názvosloví jež je registrována v Kladně

v těchto dnech vzniká nezávislá NADACE ESPERANTO - pro všeobecný rozvoj a šíření esperanta

2/ HLEDEJME SPONZORY z řad firem a podniků, které by formou peněžitého daru (daňový zákon č.108/90 Sb. a 389/90 Sb.,§ 10,odst.5) podpořily tvorbu našich fondů

3/ Využijme ve svůj prospěch jedinečnou šanci, kterou nám stát nyní nabízí - KUPÓNOVOU PRIVATIZACI.

Co musíme udělat ?

Každý z nás, kterému je 18 let a více a má trvalé bydliště na území ČSFR se může kupónové privatizace zúčastnit. Chcete-li touto formou pomoci esperantu, postupujte následovně:

DO KONCE LEDNA 1992 zakupte kuponovou knížku za 35,-Kčs, registrační známku za 1.000,-Kčs a zaregistrujte se. Knížky a známky jsou k dostání na každé poště, zde (nebo na příslušném okresním,obvodním,místním úřadě) se též můžete informovat, kde je nejbližší registrační místo.

BĚHEM ROKU 1992 pak kupóny vyměníte za akcie některého investičního privatizačního fondu nebo konkrétního podniku.

V současné době se jeví jako velmi dobrý investiční privatizační fond Komerční banky - má největší kapitál v republice a dlouhodobě zmapovaný hospodářský stav cca 1.600 privatizovaných podniků

A jsme u PODSTATY NÁVRHU :

Tak jako peníze lze darovat i cenné papíry /akcie,obligace,šeky/, které představují určitou peněžní hodnotu.

Akcie z kupónové privatizace /nikoliv ještě kupóny/ může vlastnit jak fyzická osoba /občan/, tak právnická osoba /organizace/.

DOMLUVTE SE tedy, že pomůžeme esperantskému hnutí v naší zemi, že darujeme na jeho podporu 10% ze svých akcií, tedy těch akcií, které vlastně získáme za 100,-Kčs.. Pochopitelně se nebudeme bránit darování většího množství akcií.

Akcie spolu s dalšími zdroji financí budou tvořit ZÁKLADNÍ KAPITÁL podpůrných fondů-nadací, ze kterých budou subvencovány činnosti uvedené v jejich statutu.

Fondy-nadace jsou tedy pro nás dlouhodobým cílem, ale ZAČÍT MUSÍME JIŽ TEĎ:

Jsme připraveni odpovídat na Vaše otázky a přijímat Vaše další návrhy a podněty.

za NADACI ESPERANTO
Květa Hubnová

za TERMINOLOGICKOU NADACI
ing. Jan Pospíšil